# SVISA ESPERANTO - SOCIETO
## INFORMAS

N-ro 5/1994 SEPTEMBRO-OKTOBRO

### MEMORIGAJ MOMENTOJ AL LA PENTEKOSTAJ MIGRADOJ



Noemi estis tro laca por iri ĝis la supro de Mont-Racine
Nicole kaj la urso vartas ŝin je la ekpluvo.

Estas memorindaj momentoj pensi al la pentekostaj migradoj, organizitaj de KCE kaj gviditaj de Claude kaj Andrée Gacond. La neŭŝatela ĵuraso prezentiĝis en bele verda naturo. Okazis nur kelkaj sporadaj pluvetoj, kiuj purigis la aeron, ke oni havis klaran elrigardon al valoj kaj montoj. Nia harmonia grupo ege ĝuis pri tio.
Ankaŭ la skulptaĵoj en la arbaro estis mirindaĵo.Legu en la lasta SES INFORMAS. -FL-

oo0oo

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
En restoracio Riehentorhalle.
22.9.20.00h Monata kunveno: Ni tradukos la sekvon de la kvartetludo kaj eble ni ludos.
27.10.20.00h Monata kunveno: Patrik Rentsch prelegos pri JAPANIO.

**BELLINZONA:**
10.9.17.00h kaj 8.10.17.00h, ĉiam en Viale Motta 32.

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
6.9.19.30h kaj 4.10.19.30h.

**ESPERANTORONDO BIELO:**
ĉiun vendredon en restoracio AMI, Freiestr.8 18.00-19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**
3.9. kaj 4.9.1994:**Regiona Semajnfino** en Romandio, en **cully**, proksime de Lausanne.Temo: **"ESPERANTO KIEN"?** Prelegos kaj gvidos la debaton **Giorgio Silfer** kaj **Tazio Carlevaro,**inter aliaj
- Claude Gacond gvidos paroligan grupon por la progresantoj.
- Lucienne Dovat inicos la komencantojn.
- Andres Bickel animos la vesperon per sia nova solista spektaklo: "ELEKTITAJ REPLIKOJ por ELEKTITA PUBLIKO".

La akceptejo malfermiĝos sabate la 3-an de septembro ĉirkaŭ je la 14.00h, en la HOTELO MAJOR DAVEL. La semajnfino finiĝos dimanĉe la 14-an de septembro tagmeze. Komuna vespero estos organizita en la hotelo sabate vespere antaŭ la spektaklo.

3.10.20.30h en popoldomo, salono 7, Chauderon 5.
Perla Martinelli parolos pri: **"LA 25-a JARIĜO DE LITERATURA FOIRO".**

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**

14.9.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big Ben. Gvidos Franz Brügger.

22.9.20.00h (ĵaŭdo). Paul Scherer psrolos pri: **"Kial kaj kiel parencas Eŭropaj lingvoj"?**

27.10.20.00h Diskuto pri la uzo de la tempo. Prelegos Sonja Brun:

a) **Ĉu ni donu al la vivo pli da jaroj aŭ al la jaroj pli da vivo?**

b) **Kial ni havas des malpli da tempo, jupli ni provas tempon gajni?**

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**

ĉiumonate iun vendredon laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**

12.9.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse.
Prelegos Dieter Rooke pri: **La Universala kongreso de Esperanto en Seulo.**

26.9.19.00h Libera Kunveno ĉe fam. Weidmann, Eisengasse 22.

10.10.19.00h Monata Kunveno en Karl der Grosse. Temo: **"Aplikado de esperanto en la scienco".**

24.10.19.00h Libera Kunveno ĉe fam. Weidmann.

De januaro ĝis aprilo 1994 SES ricevis la jenajn **DONACOJN**, por kiuj la estraro tutkore dankas:

F. Liechti 15.-, W. Kobelt 15.-, L. Schaerer 15.-, P. Dorthe 15.-, Ch. Sixtus 40.-,J.Hohl 25.-, D. Bühlmann 40.-, A. Kessler 5.-, W. Schaufelberger 25.-, A. Koller 35.-, E.Walder 5.-, W. Gasser 40.-, R. Schneebeli 15.-, D. Lambercy 15.-, H. Renard 20.-, L. Dovat 15.-, W. Laederach 30.-, H. Sandmeier 15.-, L. Benoît 7.- .(Entute Fr. 392.-)

oo0oo

Por la **A G A D O 2003**
ni ricevis la jenajn kontribuojn:
Lilly Schaerer 50.-, Ernst Glättli 35.- .
La estraro ankaŭ por tiuj-ĉi donacoj kore dankas.

oo0oo

**INFORMO EL ESTONIO:**

En la Balta ŝtato ESTONIO oni fondis la firmaon "MIGROSERVO", kiu helpas trovi lokon por tranokti, por individuaj turistoj, en privataj hejmoj, somerdomoj, en urboj, en kamparo, inter arbaroj, apud rivero, lago aŭ maro, somere, aŭtune, vintre aŭ printempe.
Se vi interesiĝas pri tiu lando, tiam nepre kontaktu tiun novan entreprenon "MIGROSERVO", skribante al:
Sinjoro Endel OJASILD. PK 24,
EE-0090 TALLINN (Estonio).

Detalaj informoj estas riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS: -FL-

oo0oo

## AKTOJ de la Estraro de SES: aprilo-junio 1994

Dum siaj du kunsidoj post la ĝenerala Kunveno de SES la Estraro aprobis interalie kvar aktojn. Temas pri bazaj decidoj kiuj karakterizos la agadon de nia Societo dum la tri-jara mandato de la Estraro.

### Akto 1

Nomumo de komisiito pri "SES informas"

S-ro Fritz Liechti estas komisiita prizorgi la redaktadon kaj produktadon de "SES informas", kaj ĝian dissendon laŭ la ĝisnuna praktiko.

La limoj por la kostoj situas en la buĝeto aprobita por 1994, kaj tiuj por la enhavo en la aneksa letero, kiu estas integra parto de ĉi tiu akto.

(La letero estis sendita de Perla Martinelli al la CK en dato 1993 03 22, kaj enhavas diversajn konsiderojn pri kiuj S-ro Liechti jam montris sin atenta plenumanto)

### Akto 2

Difino pri la Estraraj taskoj

En la SES-Estraro estas atribuitaj la sekvaj konstantaj taskoj:

Prezidanto - reprezenti la societon kaj subskribi ĝiajn aktojn; prezidi la kunsidojn de la Estraro kaj de la Centra Komitato.

Vicprezidanto - anstataŭi la prezidanton kaze de mal-helpo.

Sekretario - protokoli la kunsidojn de la Estraro kaj de la Centra Komitato; provizi tiujn kun-sidojn per la bezonata materialo (papero voĉdoniloj, skribiloj ktp); gardi la ori-ginalon de ĉiuj aktoj, inkluzive de mem-brolistoj.

Kasisto - prizorgi la librotenadon; prepari buĝetojn, bilancojn; urĝi la malfruajn kotizantojn.

(Tial ke S-ro Andy Künzli demisiis okaze de la unua Estrarkunsido, atende la alelekton de nova sekretario liaj funkcioj estos prizorgataj jen de la kasisto jen de la vicprezidanto)

Akto 3

Regularo por la subvencioj fare de SES

La Centra Komitato de SES rajtas asigni subvenciojn, al unuopuloj aŭ al establoj, laŭ la sekvaj reguloj:

1. La subvencio celas helpi apartan iniciaton, spe-cife utilan por la propagando, informado, publikaj rilatoj favore al esperanto.
2. La SES-membro(j) kiu(j) deziras ricevi subvencion devas skribi al la Estraro, tra la Prezidanto, kun detala priskribo de la subvenciota agadprojekto.
3. La ricevinto de subvencio havas la devon raporti pri la rezultoj de la subvenciita agado. Manke de tia raporto, skribe sendita al la Estraro, SES ne

ree subvencios la saman unuopulon aŭ establon, por alia iniciato.

4. Ne SES-anoj ne rajtas peti subvencion de SES, escepte de la societoj, kies laborlingvo estas esperanto, kaj kiuj estas jure registritaj en Svislando. Por tiuj societoj validas la sama proceduro kiel por la punktoj 1, 2 kaj 3.
5. La Estraro ne rajtas asigni subvenciojn ekster la supraj preskriboj. Ekster tiaj preskriboj decidos nur la ĝenerala Kunveno de SES.
6. La subvencioj estos enskribitaj en la ĉapitro "Informado/Propagando" de la SES-bilanco.

(La supra akto fiksis la principon ke SES ne donas la monon por individuoj aŭ kolektivoj, sed por iniciatoj celantaj informadon/propagandon)

Akto 4

Seminario por la formado de aktivuloj pri informado kaj publikaj rilatoj

La strategio de SES rilate al informado kaj publikaj rilatoj estos difinita tra regionaj renkontiĝoj kaj specifa seminario, ĝis printempo 1995.
La regiona semajnfino en Romandio (1994 09 03-04) debatos pri la diversaj lingvokonceptoj kiuj kunvivas ene de la SES-membraro.
Specifa seminario (1994 10 29-30) sub la gvido de E-lingva fakulo (D-ro Marco Picasso) enfokusigos stra-

tegiojn por la surmerkatigo de la lingvo: "Kiel vendi esperanton?" - kun la specifa subcelo varbi aliĝojn al kursoj en vesperlernejoj, lernokluboj, popol-universitatoj.
Tria aranĝo okupiĝos pri la eventuala kontribuo de la svisa esperantistaro al la enlanda lingvopolitiko.
La Estraro buĝetas mil frankojn por kovri la kostojn de la seminario, ankaŭ por subvencii la partoprenon de aktivuloj, en formo de repago de duono de la vojaĝkostoj duontarifaj kaj duono de la tranoktado, po unu reprezentanto el loka grupo. La Estraro instigas la grupojn same subvencii por ke partoprenu pli da homoj.
La Estraro komisias la prezidantinon kaj S-ron A. Mellini adekvate organizi la aranĝon, kiu okazos en Lucerno.

La 28an de junio la prezidantino de KCE skribis ĉi tiun leteron al SES:

> "Claude Gacond raportis al la Direkta Komitato de KCE dum kunsido la 24an de junio, ke fine de oktobro okazos en Lucerno semajnfino organizita de SES por lertigi movadanojn pri publikaj rilatoj (la planoj klarigitaj en via Mesaĝo de la nova prezidanto SI 3/94). Claude anoncis, ke li deziras esti en Lucerno, do

ke li deziras ŝanĝi la daton de sia semajnfino ĉe KCE. Lia semajnfino estas la tria kaj lasta parto de ciklo, kiun li decidis fari ĉe KCE — kaj kiu altiras dekon da partoprenantoj.
Nome de la Direkta Komitato de KCE mi ŝatus diri al vi, ke tiu decido de SES fiksi renkontiĝon kiam jam firmas dato de renkontiĝo ĉe KCE estas sabotado neakceptebla.
En via Mesaĝo vi skribas "rilate al transnaciaj realaĵoj, kiuj ekzistas en la svisa Esperantio (KCE, CDELI, LF-koop ktp) mi intencas flegi kiel eble plej harmoniajn rilatojn, en reciproka plena respekto de la propra aŭtonomio". Vi ĵus maltrafis bonan okazon fari tion.
Claude raportis, ke la lucerna semajnfino tute ne povas okazi je alia dato; eble, sed tio ne pravigas vian decidon.
Vi certe konas nian tradicion, kiu konsistas je organizo de semajnfinoj ĉiam la lastan semajnfinon de la monato. Tio estis kaj estas tiel, precize por ke ĉiuj sciu, kiam ne organizi regionajn aŭ aliajn aranĝojn. Alia fakto: nia semajnfino estas fiksita jam de ses monatoj, en 8000 programoj presita kaj disvastigita en revuoj svise kaj tutmonde. Via aranĝo estis decidita antaŭ du semajnoj, laŭ mia scio, kaj ne estis verŝajne ankoraŭ publike anoncata.

Pro tio, ŝajnas racie, ke estas al SES la respondeco respekti la aliajn kaj modifi sian iom tro rapide faritan decidon.

Mireille Grosjean,
prezidantino de KCE

Al la supra letero respondis nia prezidantino:

"Via rimarko pri la dato de la SES-seminario estas prava, kaj ankaŭ mi miris, ke en la SES-kunsido ĝuste kolego Gacond opiniis pli oportune ke KCE ŝanĝu la sian, prefere ol SES klopodu traŝovi la aranĝon. Mi volonte instigos la Estraron, se eble, modifi la daton, sed tio dependas precipe de la gvidonto kaj multe ankaŭ de lokaj cirkonstancoj. Espereble la demando rapide solviĝos en unu aŭ alia maniero, kaj KCE estos tuj informita.

Perla Martinelli

Post kontakto kun la gvidonto de la seminario kaj esploro ĉe la seminariejo montriĝis ke ne eblas modifi la daton, ene de ĉi tiu aŭtuno.
La deziro eviti malkonvenan periodon kaj maloportunan konflikton kun KCE kaŭzis, ke la seminario devas esti prokrastita. La Estraro decidos pri la nova dato.

ooOoo

# FONDAĴO TALENTO

Junio 1994

Estimataj gesamideanoj,

Kiel vi certe scias, Talento-Lernejo en Hungario estas unu el la malmultaj lernejoj en la mondo, kiu aparte atentas pri Esperanto-instruado kaj al la medio - protektadaj principoj. En la Talento-Lernejo, la infanoj ekde la unua lerno-jaro lernas Esperanton, kaj per Esperanto jam sin prezentis en diversaj pedagogiaj mondkongresoj ktp.

Nun starante je la sojlo de nova lernojaro, nin alfrontas decida problemo, kiu povas entute endanĝerigi la sorton de la Esperanto-instruado en la lernejo. Nome por instrui al la novaj gelernantoj en la unua klaso, ni urĝe bezonas novajn Esperantistajn pedagogojn. Jen ni volus peti vian helpon por varbi pluajn du Esperanto-instruist-(in)ojn kun la jenaj kondiĉoj:

1e lingve, ili devas esti sufiĉe lertaj kaj kapablaj, prefere (sed ne nepre) diplomitaj pri Esperanto kaj Esperanto-instruado.

2e pedagogie, ili devas koni sufiĉe profunde pedagogiajn principojn pri infan-edukado kaj instruado, kun bona instruad-sperto. Lertaj kaj spertaj pedagogoj estas nepre bezonataj, ĉar por la 6-jaraj infanoj tio

estos la unua renkontiĝo kaj kun lernejo kaj kun Esperanto. Ankaŭ la gepatroj formos sian opinion pri Esperanto grandparte surbaze de laboro kaj konduto de la Esperanto-instruistoj.
Karaj gesamideanoj, ni petas anonci nian aferon inter niaj samideanoj en viaj Esperantistaj kunvenoj, kluboj, gazetoj kaj informiloj.
Ni petas, ke volontuloj aŭ interesitoj kontaktu nin rekte por pliaj informoj ĉe:

Talento Iskola
Poŝta adreso: H-2041 Budaörs, PF. 102,
Telefono/fakso: (36 1) 1868854, 1669866, 1857183.

Mortera Mirbaghian
Esperanto-instruisto
de la Talento-lernejo

Andreás Lukács
Prezidanto
Fondaĵo Talento

oo0oo

Sub la aŭspicio de **P R O H E L V E T I A**

**JUBILEA SEMAJNO OMAĜE AL LITERATURA FOIRO**

organizas **PEN CLUB INTERNATIONAL**, Esperanto-Centro kunlaboras Kooperativo de Literatura Foiro kaj Universitato **ELTE:** Esperanto-Fako, **10-16 septembro 1994**, Fáklya Klub, Csengery u. 68 Budapest (apud Nyugati-stacio).
Detalaj informoj riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS.



**KULTURA CENTRO ESPERANTISTA**

**SEMAJNFINO:** 24-a ĝis 25-a de septembro 1994

**FUNGOJ, BEROJ, PLANTOJ:**

Kun **Alain Favre** (Savojo) instruisto, vicprezidanto de KCE.

Promenadoj al karakterizaj pejzaĝoj kun interesa flaŭro. Kun specifa atento al fungoj, beroj kaj nekutimaj plantoj. Piknikoj en la naturo aŭ en gastejo laŭ la vetero.

Sabate vespere oni komune manĝos rakledon aŭ fonduon en la kultura Centro Esperantista. Dimanĉe tagmeze oni komune piknikos survoje , lunĉos en KCE aŭ en urba restoracio.

**23-a ĝis 28-a de oktobro 1994**

**AŬTUNA STUD-kaj FERIORESTADO** por komencantoj kaj progresantoj, kun la instruistoj de la KCE-a skipo/KIS.

Ĉi-tiu 6-taga lingvokurso ĉefe por komencantoj celas konatiĝi kun Esperanto, ties lingvo, literaturo kaj historio. Oni enprofundiĝos en la lernado de la lingvo aŭde, lege kaj parole. Matene oni studos, posttagmeze oni libertempos aŭ ekskursos tra la bela ĵurasa regiono vizitante vidindaĵojn. Kompetentaj instruistoj zorge gvidos la parteprenontojn tra tiu kurssemajno (Lucienne Dovat, Alain Favre, Cosette Cop, Andy Künzli kaj aliaj; kontribuos Mireille Grosjean kaj aliaj).

**JUNULARA SEMAJNFINO** de la 29-a ĝis la 30-a de oktobro 1994.

Ĝenerala asembleo de Junularo Esperantista Svislanda/JES (posttagmeze).

Porjunulara programo post la ĝenerala kunveno.

**SEMAJNFINO:** 29-a ĝis 30-a de oktobro 1994.

**LINGVOKURSO POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ:**
Kun Jean-Jacques Lavanchy (Svislando), instruisto-pedagogo, (komencantoj), kaj kun Mireille Grosjean-Robert (Svislando), instruistino, prezidantino de KCE, (progresantoj).
La studa semajnfino por komencantoj kaj progresantoj celas precipe la franc- kaj germanlingvajn partoprenantojn de la Perkoresponda Kurso Programita (PKP) de KCE. Sed ankaŭ ĉiuj aliaj interesitoj estas bonvenaj. Oni diskutos pri problemoj renkontitaj dum la studado, solidigos siajn konojn kaj lernos kompreni kaj paroli Esperanton, aŭde, lege kaj skribe.La instruisto, kiu adaptiĝos al la individue diversaj lingvoniveloj, pretos respondi al la demandoj.
Ambaŭ instruistoj. multjare spertaj, aplikos lernmetodon, kiu montriĝis sukcesa, ĉar ĝi estas kaj sistema kaj distra.

Sabate vespere oni komune manĝos rakledon aŭ fonduon en KCE.
Dimanĉe tagmeze oni komune lunĉos en KCE aŭ en urba restoracio.

**STUDA SEMAJNFINO POR PROGRESANTOJ:**29-a ĝis 30-a de oktobro 1994.

**CIKLO PRI LA LITERATURO, LINGVO KAJ HISTORIO DE ESPERANTO.**

**PARTO III: 1922-1939: Per la revuo "Literatura Mondo" maturiĝas la lingvo**

kun Claude Gacond (Svislando), instruisto, kunfondinto kaj komitatano de KCE,arkivisto de CDELI.

Ĉi-tiu kurso celas la publikon, kiu ŝatus progresi en Esperanto, aŭde, lege kaj pa-
daŭrigo p 16

## V A R M A   N O V A   J A R O

En la varma Afrika lando Ganao okazos la TRIA AFRIKA KONGRESO de la 23-a de decembro 1994 ĝis la 7-a de januaro 1995.
Jam multaj Afrikaj Esperantistoj dum jaroj atendas tiun Trian Kongreson, ĉar post la Unua kaj Dua Kongresoj en 1990 kaj 1991 ne venis rapide la Tria. Kial ne? Ne pro manko de sukceso. La Eŭropaj kaj Afrikaj kongresintoj revenis entuziasme el Togolando (Unua Kongreso) kaj Benino (Dua Kongreso). Sed simple la subvencioj de UEA ne sufiĉis por nova kongreso.
Nun tamen ĉiuj kore bonvenigos Afrikajn kaj Eŭropajn Esperantistojn en kongreso kun propra, unika etoso. La programo estos varia. La vetero estos bela (ĉ.25°). La loĝejo estos simpla sed agrabla ( studenta sporta kolegio). La interrilatoj estos varmaj. Okazos kursoj pri Esperanto kaj pri instru- metodo (Cseh) fare de Afrikaj kompetentuloj kaj de Atiljo Orellana.
La kotizo inkluzivas alflugon el Eŭropa flughaveno kaj revenon, plenan programon kaj solidarecan pagon, sed ne vizojn kaj asekurojn, nek apartajn turismajn aranĝojn, ekskursojn ktp. Tiu kotizo estas 2980 ned.gld.

Eĉ se vi ne jam certas, tamen anoncu vin. Malanonco estas pli facile ebla ol novanonco en lasta momento. Skribu al: H.Bakker, Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam.

-HB-

oo0oo

MEMORIGO AL:

**2-a Internacia kultura kaj turisma semajno**
(sub aŭspicio de Hispana Esperanto-Muzeo).
**SANT CUGAT DEL VALLES** 15-a - 22-a de oktobro 1994. (Rigardu en SES INFORMAS 4/94).

oo0oo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr
Red. Telefon 01/381 77 13

role. Oni legos tekstojn el la Esperanta Literaturo, faros gramatikajn kaj struktur-ŝanĝajn ekzercojn, konversacios kaj dum prelego ekscios ion interesan pri la historio de Esperanto. La instruisto adaptiĝos al la lingva nivelo de la kursanoj kaj pretos respondi al iliaj demandoj.

Claude Gacond estas multjare sperta instruisto de Esperanto. Liaj profundaj konoj de la esperantaj literaturo, lingvo kaj historio ĉiam estas neforgesebla sperto por ĉiu partoprenanto de liaj kursoj.

Sabate vespere oni komune manĝos rakledon aŭ fonduon en Kultura Centro Esperantista. Dimanĉe tagmeze oni komune lunĉos en KCE aŭ en urba restoracio.

ooOoo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 6/94 estas la 8-a de oktobro 1994.**

ooOoo